30 -11- 1990



# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 10a j. n-ro 8, nov. 1990

## Estraro

*Prezidanto:* Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge. Tlf. (091) 57 63 84.

*Sekretario:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Eksteraj rilatoj:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido Van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

10a de novembro 1990

## 1 Financoj

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

### 1.1 Spezokonto

La ciferoj de oktobro ne jam estas pretaj. Ne ekzistas nova prognozo.

### 1.2 Oficejo

Jean Pierre VandenDaele transiros al tri-kvinona laborsemajno ekde la 1a de januaro 1991. Per la liberigita mono, FEL dungos kroman presiston kiu povos helpi al la nuna. La nova oficisto jam provlaboris kontentige dum du tagoj. La intenco estas, ke li laboru unu-du tagojn semajne.

### 1.3 Telekartoj

La 500 telefonkartoj kun teksto en Esperanto, kiuj estis destinitaj por la Belga merkato, jam ĉiuj vendiĝis antaŭ sia apero. Restas ankoraŭ kelkaj kartoj haveblaj por la internacia merkato. Oni vendas ilin nun kontraŭ 295 BEF + afranko, sed — laŭ nia telekart-specialisto – la valoro baldaŭ atingos po 1000 frankojn.

### 1.4 Eldona agado

- La verko *Urd Hadda murdita!* estas kontrolita de Rejna de Jong kaj nun prespreta. Ni eble povos presi ankoraŭ ĉi-jare, sed certe ni ne trovos bindiston kiu pretas bindi antaŭ novjaro.





- Kompostataj estas nun du poemaroj, unu de Emile Van Damme kaj unu de Christian Declerck. Ambaŭ aperos en la Stafeto-serio. Van Damme supozeble ankoraŭ antaŭ la 15a de decembro.
- Finkompostita estas *La Fundamento sub lupeo*, kompostota restas *Renardo la Vulpo*.
- Ni daŭre atendas por la historia libro la antaŭparolon de Claude Gacond.
- Venis propono pri eldono de nova manuskripto: *La sepiaga murd-enigmo* de Aŭstralia aŭtoro. Du membroj de la eldona komisiono voĉdonis por la eldono; unu kontraŭ. Ĝi do eldon-iĝos.
- ID petas al PP esplori kiom da niaj libroj vendiĝas tra libroser-voj kaj kiom al privatuloj. El tiuj ciferoj eblus konkludi kiom da ekzempleroj oni devas vendi por rehavi la investitan kapitalon. [1]

### 1.5 Perpoŝtaj vendoj

La perpoŝta kampanjo por varbi novajn legantojn de *Monato* jam rikoltis pli ol 100 abonojn. En Nederlando la rezulto estis 22 %, en Francio 15 % kaj en Britio 13 %. Nun kampanjo estas okazanta inter Svedoj.

### 1.6 Lifto

Ekde la 1a de majo estos malpermesita uzi plu la lifton de la Esperanto-domo. ID proponas riparigi ĝin parte per volontuloj. RR volus tute likvidi ĝin kaj konstrui ŝrankojn en tiu loko. PP petos prezoferton de specialisto pri renovigo de la lifto. La temo revenu sur la tagordo.

[1] Intertempe la ciferoj estas konataj: Al libroservoj vendiĝas antaŭ la aperdato 11,6 %, post la aperdato 54,9 % (entute: 66,5 % de la tuta stoko) — Al individuoj 6,7 % antaŭ la apero kaj 26,8 % post la apero (entute: 33,5 %). Se oni ne konsideras la rentoperdon, FEL rehavas la en libroj investitan kapitalon post forvendo de 45 % de la verkoj. Se oni konsideras rentoperdon, la kapitalo revenas post forvendo de 50 % de la libroj.

### 1.7 Asekuroj

Asocioj kiuj organizas kunvenojn k.s. ekde nun devas asekuri sin kontraŭ la ĵargone nomata "civila respondeco". ID petos al Jan Bovendeerd konsilojn ĉi-rilate.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj tri plus Alex Humet, Jos Vandebergh kaj parte, kiel invitito, Guido van Damme, redaktoro de *Esperanto-Panorama*.

### 2.1 Rilatoj oficistoj-estraro

JV kredas, ke la redaktoro de *Esperanto-Panorama* kritikis la estraron kaj la decidojn de la lasta membrokunveno, en la novembra-decembra numero. La redaktoro klarigas, ke li tute ne intencis kritiki nek unu nek la alian. Ankaŭ ĉiuj aliaj estraranoj ne opiniis la tekston kritika. JV pretas akcepti, ke li miskomprenis.

Leviĝas la demando, ĉu redaktoro rajtus kritiki la estraron en la paĝoj de *Esperanto-Panorama*. La opinioj de la estraranoj varias inter "devas kritiki" (RR) ĝis "neniu ne rajtas esprimi malsamopinion" (JV). Decido ne estas farita, sed ID proponas ne forgesi, ke tiu revuo direktas sin ĉefe al ne-esperantistoj, kaj ke ni ne montru al ili niajn eventualajn malfortajn flankojn.

JV estas tre surprizita pri la fakto, ke PP dungis novan oficiston sen lia scio. PP klarigas ke li dum sia tuta direktoreco ĉiam tute memstare dungis kaj maldungis oficistojn. Eĉ lia laborkontrakto klare diras ke li faru mem ĉiujn decidojn kiuj rilatas al la funkciado de la centro.

### 2.2 Esperanto-Panorama

La preparlaboroj por la nova aspekto de nia informrevuo bone progresas. La formato restos supozeble A5, kiel antaŭe. Ĝi havos brilan kovrilon, dukoloran, seeble kun foto. La flavaj paĝoj malaperos. Ilia enhavo troviĝos en aparta rubriko de la revueto mem. La internaj paĝoj kiel kutime estos presitaj sur reciklita neblankigita papero. La titolo *Esperanto-Panorama* verŝajne malaperos.



AH proponas mencii la adresojn de la lokaj grupoj, de iliaj kunvenejoj ktp. nur dufoje jare, kaj ne en ĉiu numero kiel nun. Tiu loko povus servi al aliaj sciindajoj. La programoj aperu en ĉiu numero. Post iom da diskuto estas akceptita tiu propono. La adresoj de ĉiuj Flandraj kaj Nederlandaj grupoj aperos nur en la maja-junia kaj en la novembra-decembra numero. Antaŭ la apero de tiuj numeroj la menciitaj grupoj ricevos fotokopion de la kompostita versio, kiun ili resendu kun eventualaj korektoj.

AH proponas uzi iom pli grandan litertipon kaj pli da ilustraĵoj. Krome enhavtabelo estus dezirinda.

Pri la nova nomo de la revuo, la estraranoj pledas por Horizon-taal. ID petas al PP esplori ĉu la esprimo Horizon-taal ne estas registrita en Nederlando.

Leviĝas longa diskuto pri la uzo de reciklita papero. AH kaj GvD estas por la uzo de tiu papero. JV volus transiri denove al blankigita papero. Li ne kredas al PP kiu dum la membrokunsido asertis ke reuzpapero kostas malpli ol ordinara kaj pro tio li kunportis ateston de Limburga presisto, kiu deklaras ke "reciklita papero estas tro multekosta". PP estas tre kolera pri tiu esprimo de malfido, kaj proponas ke oni kontrolu la librotenadon se oni ne kredas je liaj vortoj.[2]

RR proponas ke ankaŭ la lokaj grupoj aktualigu kaj plibeligu la titolpaĝon de siaj revuoj.

### 2.3 Diversaĵoj

Eŭropa manpremo — AH ekzamenos la eblecojn por ke la Centro ellaboru la kampanjon. La punkto revenu sur la decembra tagordo.

Kuba profesia deklamistino verŝajne vizitos Belgion en decembro. Grupoj kiuj volas inviti ŝin telefonu al (02) 735 38 31 (vespere) aŭ (02) 235 84 98 (tage).

## 3 Venontaj renkontiĝoj

Zamenhoffestoj: Je la 9a de decembro en Gent, je la 14a en Antwerpen, je la 15a en Bruselo kaj je la 17a en Hasselt.

[2] La preciza prezo de unu folio de reciklita papero en formato DIN A3 estas nun 0,442 frankoj, de unu folio de blanka papero estas nun 0,566 frankoj.

# 4 Vivo de la kluboj

Ni provos ekde nun ankaŭ aperigi novaĵojn pri la aktivecoj de la lokaj grupoj.

Jen jam iom da sciigoj pri la novaj kursoj: Serio da gazetartikoloj en julio kaj aŭgusto kaj precipe radio-programo en "De kleren van de Keizer" (Radio 1) kiu provokis 52 petojn pri kurseblecoj bone influis la varbadon. Kortrijk organizis gazetaran konferencon pri siaj aktivecoj, kiu rezultigis tutan serion da gazetartikoloj en tagaj kaj semajnaj revuoj, kaj eĉ intervjuon en libera radio kaj Radio 2. Limburg partoprenis informajn borsojn en Hasselt kaj Houthalen. Antwerepen lanĉis sukcesan kampanjon "Horizon-taal" inter studentoj.

Jen kelkaj rezultoj, ĉefe pri kursoj por komencantoj:

Antwerpen, oficiala kurso, 1a jaro, 19 lernantoj; matena kurso en la Esperanto-centro, 8 lernantoj; vespera kurso tie, 4 lernantoj.

Brugge, 8 lernantoj.

Genk, 6 lernantoj.

Gent, 18 en la 1a jaro, 12 en la 2a.

Hasselt (Dopa), 6 lernantoj.

Houthalen, 22 anonciĝis, nur 20 akcepteblis!

Kortrijk St.-Jozef: 5; aliaj: 13; 3a-aĝuloj: 10.

Leuven: vesperkurso 9; vaporkurso 4.

Lokeren: Infankurso havis 15 lernantojn. En septembro aliĝis 3 pliaj.

Oostende: Infankurso, 6; A-kurso, 8; B-kurso, 12.

Zele: 12 lernantoj.

Rapidkurso por skoltoj: 6 lernantoj.

Kurso por konscienc-obĵetantoj: 6 lernantoj.

Venis formala peto por organizi kurson en Turnhout/Rijkevorsel.

Tio sendube estas ege kuraĝiga rikolto! Kaj eble la listo ne estas kompleta. Kompletigojn bv. sendi al la Centro por Ivo Durwael.

# 5 Busvojaĝo al Bergen nuligita

Pro timo de trafikproblemoj en Norvegaj montaraj vojoj, la estro de Patrick de Saedeleer malpermesis la vojaĝon per Belga buso. Sekve ni devos rezigni je niaj planoj. Ni ankoraŭ esploros eblecojn de komuna luado de feriodomo por malaltigi la kostojn de loĝado.